

„Kara antikva malpura Dublino”

Monato

27a jarkolekto - julio 2006/7

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Monata revuo en Esperanto - Maandelijks - Antwerpen X - ISSN 0772-456 X



In-iciato kontentiga en Togolando

La fina fazo
de la enkonduko de eŭro



Memore je la pereintoj

33a KATALUNA KONGRESO DE ESPERANTO



Amposta (Katalunio)
6an, 7an kaj 8an
de decembro 2006

www.esperanto.cat



Kataluna Esperanto-Asocio

kun la subteno de:



Generalitat de Catalunya
Departament
de Cultura



Ajuntament d'Amposta

Nova libro de
**Christian
Declerck**



La libro havas „membrografian meĉon”, ĉirkaŭitan de „materialo dokumenta”, vakso kiu nutra la flamon kaj ĝi brulas lante kiel kandelo. Ĝi donas bildon pri nia mondo fine de la dua jarmilo. Laŭ Donald Broadribb, la tuta libro temas „pri la mensostato de la aŭtoro”. Se tiel, ĝi estas serĉo de la vero - verko kun filozofia subfluo.



Paĝoj: 656; 21 cm; ludre bindita; 2002;

Prezo: € 38,00

Informoj:

tel. +32 3 234 34 00;

tlk. +32 3 233 54 33;

rete: butiko@fel.esperanto.be

<http://retbutiko.esperanto.be>

Furoro de

In-iciato kontentiga 11

FOTO DE LA KOVRILO: LORENZ KHAZALEH



En 1996 Togolando iniciatis kunlaboran programon aprobitan de UNICEF por eduki kaj knabinojn kaj gepatrojn. La celoj estis altiĝi je 80% la enskribiĝon de knabinoj en la vilaĝaj lernejoj. La projekto montriĝas sukcesa.

12 SEPA: La fina fazo de la enkonduko de eŭro



Por multaj eŭropanoj la uzo de eŭro-monbiletoj kaj -moneroj iĝis tute normala afero. Por eŭro-pagoj per banko kaj per karto jam iom estas realigite, sed vera eŭro-zono ekzistos nur ekde la jaro 2010.

„Kara antikva malpura Dublino” 13



Neniu devas enui en Dublino – urbo de muzikistoj, poetoj kaj mondfamaj verkistoj.

24 Memore je la pereintoj

Ĉi-jare, la 27an de januaro, en la 61a datreveno de la liberigo de koncentrejo Auschwitz-Birkenau, denove la mondo honoris la pereintojn de Holokaŭsto



POLITIKO

Opinio	8
Reveno al la hejmlando	
Albanio	9
Protestas Ĉinio	
Hungario	10
Konvinka venko	
Albanio	10
Post bendo - fendo	

MODERNA VIVO

Naturo	11
Kribilo mortiga	
Togolando	11
In-iciato kontentiga	

EKONOMIO

Eŭropa Unio	12
SEPA: la fina fazo de la enkonduko de eŭro	

TURISMO

Irlando	13
„Kara antikva malpura Dublino”	

NOVELO

La velka rozo	13
---------------------	----

LIBROJ

La unua Zamenhof-monumento de la 21a jarcento: dika Pomego!	18
Pomo utila ... sed kun vermeto	21
Opinio	23
Valora „pripensindaĵaro”? Alia opinio	

SPIRITA VIVO

Pollando	24
Memore je la pereintoj	

ŜERCO KAJ SATIRO

Japanaj ŝercoj	26
----------------------	----

Abonoj	4
Enkonduko	5
Leteroj	6
El mia vidpunkto	7
Anoncetoj	27

Kiel pagi vian abonon de MONATO?

► Rekte al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank, 1000 Brusel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodatan fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be (eblas ĉifri la mesaĝon per PGP/GPG).
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- Per bankĉeko traktita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO		La Jaro aere	
		surface	aere	1 fojon monate	tuj
Argentino	EUR	23	25	5	10
Aŭstralio	AUD	82	90	9	17
Aŭstrio	EUR	46	50	5	9
Belgio	EUR	46	50	5	9
Brazilo	EUR	23	25	5	10
Britio	GBP	32	35	4	6,5
Bulgario	EUR	23	25	5	9
Ĉeĥio	EUR	30	34	5	9
Danio	DKK	345	375	40	70
Estonio	EUR	23	25	5	9
Finnlando	EUR	46	50	5	9
Francio	EUR	46	50	5	9
Germanio	EUR	46	50	5	9
Germanio orienta	EUR	41	45	5	9
Grekio	EUR	41	45	5	9
Hispanio	EUR	41	45	5	9
Honkongo	EUR	41	42	5	10
Hungario	EUR	23	25	5	9
Irlando	EUR	46	50	5	9
Islando	EUR	46	50	5	9
Israelo	EUR	41	42	5	10
Italio	EUR	46	50	5	9
Japanio	JPY	6600	6900	860	1220
Kanado	CAD	73	78	9	15
Kipro	EUR	30	34	5	9
Koreio	EUR	41	42	5	10
Kroatio	EUR	23	25	5	9
Latvio	EUR	23	25	5	9
Litovio	EUR	23	25	5	9
Luksemburgo	EUR	46	50	5	9
Malto	EUR	30	34	5	9
Nederlando	EUR	46	50	5	9
Norvegio	NOK	370	430	45	71
Nov-Zelando	NZD	93	99	9	18
Pollando	PLZ	99	110	22	36
Portugalio	EUR	36	41	5	9
Rusio	EUR	23	25	5	9
Singapuro	EUR	41	42	5	10
Slovakio	EUR	23	25	5	9
Slovenio	EUR	30	34	5	9
Sud-Afriko	EUR	41	42	5	10
Svedio	SEK	430	465	49	84
Svislando	CHF	71	82	9	14
Tajvano	EUR	41	42	5	10
Usono	USD	61	63	8	13
Bazo eŭropa	EUR	46	50	5	9
Bazo ekster-eŭropa	EUR	48	50	5	10

Aliaj landoj: Petu la tarifon de la landa peranto, aŭ, se tiu ne ekzistas, de la eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Telefono +32 32 34 34 00; telekopiiilo +32 32 33 54 33.

► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libro servo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: esperfed@ans.com.au.
- **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazilo:** Brazilo Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** David Kelso, 5 Craighenhill Road, Kilncadzow, CARLUKE ML8 4QT, Tel 01555 759 166. Reto: davidekelso@yahoo.co.uk
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variabi. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- **Dana:** Revusero de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estono:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finnio:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafofficejo@esperanto.fi
- **Francio:** Unuigo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:** Hilde Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg (banko: LIGA Augsburg 113514, BLZ 750 903 00). Reto: s.h.maul@t-online.de.
- **Literatura-Servo "Espero",** Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schwering (Volksbank Grafschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: RoBo. ESPERO@t-online.de.
- **Hans Dieter Platz,** Postfach 1148, D-34303 Nidenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
- **Wolfgang Schwanzer,** Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakats u. 1/3 III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- **Irano:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japanaj:** KLEGG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Osaka-hu 561. Reto: kleg@mvf.biglobe.ne.jp.
- **Japano Esperanto-Instituto,** Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. esperanto@jei.or.jp.
- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159, Sydney, B.C., V8L 3S6. Reto: iwioleskatl@shaw.ca.
- **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Koreo:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperant@unitel.co.kr
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miauguau@racsa.co.cr
- **Kroato:** Kroato Esperantista Unuigo, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litova:** Laimius Stražnickas, a.k. 1469, LT-10009 Vilnius-40, Litovio. Reto: stralaim@takas.lt.
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvego:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- **Pola:** Skribu al la eldonejo kaj pagu al Danuta Leyk, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328@PKO BP XIV O/Wwa.
- **Ruslandaj:** Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalingrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
- **Mikaelo Ĉertilov,** Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.81 0.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
- **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- **Svedaj:** Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
- **Sveda Esperanto-Federacio,** c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum, Husarlyckevägen 29, S-242 94 Hörby. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
- **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
- **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org
- **Venezuela:** Peter Jaimez, Apartado 3482, Caracas 1010A. Reto: peterjaimez@tutopia.com.



Ŝpar-hoteloj

Komenciĝas en Eŭropo kaj aliaj kontinentoj la libertempa sezono. Do vi por turismi aŭ kongresumi bezonos hotelojn. Por faciligi al vi elekton, ni testis hotelon de unu el tiuj grandaj ĉenoj, kiuj ĉie starigis same ekipitajn hotelojn kaj logas per moderaĵoj. Ni pagis por unu nokto en dulita ĉambro 95 eŭrojn – tolerebla sumo por hotelo centre en grandurbo. Por ni estis nova sperto loĝi en tia ŝpar-hotelo, kaj rapide ni komprenis la sistemon: oni ŝparas ĉiun superfluan centimetron kaj tiel ebligas moderaĵojn. La lito konsistas el (bonaj) matracoj nur 90 cm larĝaj, kiuj kuŝas sur simplaj kadroj – oni do ŝparas multekostan lignon. Mebloj ne troviĝas en la ĉambro, nur larĝa breto, kiu parodias tablon, kaj remburita benketeto kaj du etaj murbretoj apud la matracoj por deponi okulvitrojn. 30 cm larĝa stangeto inter muro kaj vertikala breto servas por pendigi pantalonon kaj jakon, tri pliaj bretoj imitas ŝrankon sen pordoj. Do ni devis lasi la plej grandan parton de niaj vestaĵoj en nia valizo, kiu okupis duonon de la libera spaco. Nokt-lampetoj en la muro kompletigas la ekipaĵon – ho jes, mi forgesis: du grandaj speguloj pligrandigas la ĉambreton, en kiu ni nur pene povis pasi unu apud alia. Kiam ni lasis kelkajn aĵojn sur la planko, ni devis stilziri kiel ibiso.

Kulmino de ŝparado estas la „banĉambro” tri-kvadratmetra: lavopelvo, necesujo kaj duŝilo kun triangula kuvo sen iu ebleco deponi ion. Du speguloj, unu super la pelvo kaj alia sur la pordo, donas denove impreson de vasteco ...

Matenmanĝo kun modesta bufedo kostas 10 eŭrojn, adekvata prezo por tristela hotelo. Sed en la manĝejo oni ŝparas je mebloj: tabletoj estas ĝuste tiel (mal)larĝaj, ke du pletoj trovas lokon. Kiel ajn, estas sistemo, kiu sekvas la principon de minimumo. Nenio nepre necesa mankas, sed mi havas la impreson, ke kontraste al vera gastronomio kaj hotelismo, kiuj faras ĉion por plejble komforto de gastoj, tiaj hotelĉenoj strebas nur al profito. Do ili harmonias kun la tutmonda tendenco gajni laŭeble multan monon per laŭeble malmultaj ekipaĵoj. Por tiaj hotelistoj gasto estas nur kliento, kiu alportas profiton. Cetere, eĉ fakturon oni ŝparas: ni ricevis nur kvitancon pri la pagita sumo (sen iuj detaloj) sur – uzita slipo. Mia konsilo do estas: se vi ne insistas esti gasto sed nur tranoktanta, vi povas loĝi tie. Agrablan libertempadon!

Sincere via

Stefan MAUL

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 27a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopio: +32 3 233 54 33, retroŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anoncartarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hector Alós i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Matil Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Joan-Ferriol Masip i Bonet.

redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.
- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.
- **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.
- **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net. **Nota:** Librecojn oni ne sendu al la redaktoro proprainciete. La kunlaborantoj ricevas la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.
- **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.
- **Medio:** Maritza Gutierrez Gonzalez, Avellaneda 212, e. Gertrudis y Josefina, 10500 Habana, Kubo. Rete: medio@monato.net.
- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.
- **Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, Rua Rio Jutai 320, 82840-420 Curitiba PR, Brazilo. Rete: noveloj@monato.net.
- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.
- **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.
- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net
- **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/ja 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.
- **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Ne irlandgaela, sed skotgaela

Kvankam mi estis aŭtoro de *Lingva Davido kontraŭ Goljato* (MONATO 2006/4, p. 19-20), ne estis mi, kiu elektis la bildojn. La dua ilustraĵo sur paĝo 20 ne taŭgas por eseo pri la gaela lingvo en Irlando, kvankam ĝi estas tre interesa kaj unika. Temas pri la titolpaĝo de ege rara kaj antikva biblio en la gaela lingvo, tradukita el la hebrea en la gaelan de William Bedel kaj el la greka de William O Domhnuill, kiu, por komuna profito de la skotaj gaejoj, estas transskribita el la irlandaj tiparo al la legeblaj romiaj minuskloj.

La historio de tiu versio estas interesa. Ekde la alveno de la kristana religio en la 5a jarcento, la irlandanoj konis Bibliion en la latina lingvo. Neniu gaela traduko ekzistis ĝis preskaŭ la fino de la 16a jarcento, kiam la aŭtoritatoj de la anglikana eklezio proponis tradukigi la Novan Testamenton. En la 17a jarcento aperis irlandaj eldono de la tuta Biblio, tradukita de O Domhnuill kaj Bedel, populare konata kiel „Bedel-biblio”. Ĉar en tiu epoko apenaŭ estis diferenco inter la gaela uzata en Irlando kaj tiu en Skotlando, aparta eldono por uzo en Skotlando estis presita en Londono, post antaŭpreparo en Dublino. Tamen oni baldaŭ konstatis, ke la skotgaejoj ne povis kompreni la originalan Bedel-tekston, ĉar tiam – kaj eĉ ĝis la lasta duono de la 20a jarcento – la tiparo, per kiu oni en Irlando presis gaelajn tekstojn (inkluzive tiun de la Bedel-biblio), estis la bela mezepoka manuskripta alfabeto. La ilustraĵo en MONATO do rilatas al represoj publikigita en la jaro 1690 kaj taŭgas ne por artikolo pri la irlandgaela, sed por bildigi specimeno de la skotgaela, kiu dum la jarcentoj post la 17a multe ŝanĝiĝis kaj evoluis ĝis aparta lingvo hodiaŭ ankoraŭ parolata en Skotlando.

Garbhan MACAOIDH
Irlando

Senpagaj programoj estas malsamaj

Kiam Roland Rotsaert recenzis senpagajn programojn kiel *OpenOffice.org* kaj *Thunderbird* (MONATO 2006/3, p. 19-20), li diris, ke ili ankoraŭ havas mankojn, ĉar oni ne povas ekzemple malfermi *Access*-dosierojn facile aŭ movi retadresojn el *Netscape* perfekte. Mi scivo-

las, kiom ofte sinjoro Rotsaert penis movi retadresojn al *Netscape* el aliaj programoj aŭ malfermi *OpenOffice.org*-dokumentojn per *Word?* Novaj senpagaj programoj (kaj aparte liberaj programoj kiel tiuj) tre, tre pli bone povas uzi fremdajn dosierojn, ol povas pagendaj programoj. Fakte, la recenzo diris nenion pri la uzeblo de *Firefox* aŭ *Thunderbird*. Jen lia plendo: „Ili ne estas *Netscape*.”

Ian MAXWELL
Usono

Bato sub la zono (4)

Konsternis min la reago de Monik Robert-Bernard al la artikolo de Gerrit Berveling kontraŭ la kandidatigo de Hirsi Ali por la Nobelpremio pri paco. Ŝokas min ŝia postulo, ke „islamo” luktu por forigi tiun malhumanegan fikutimon, kvankam ŝi mem akceptas, ke tiu naŭzaĵo estas antaŭ-islama. Islamo fakte tute ne rilatas al ĝi, se oni konsideras Koranon kaj la plej gravajn verkojn de tiu religio. Plie, tiu mutilado tute ne estas disvastiĝinta inter la treege larĝa plimulto de islamaj landoj, i.a. ne inter la araboj. Laste, sed ne balaste, islamismo estas multflanka kaj multkapa: ĝi neniel estas organizita tiel fere kaj piramide kiel ekzemple katolikismo. Ŝajnas do al mi tre facilanime postuli al tuta religia komunumo, ke ĝi aktive kontraŭstaru fremdan kutimon, eĉ plej aĉan, endemian en unu el ĝiaj periferioj. Tiaj esprimoj evidentigas al la okuloj de islamanoj nesupereblan arogantecon de eŭropanoj, kiuj ĉiel sentas sin kapablaj primoki islamon, kaj konfuzas religion kun moroj – dum ili ja bone kapablas disigi la du aspektojn ekzemple en Biblio. Ni bonvolu esti pli toleremaj kun aliaj komunumoj.

Hektor ALOS I FONT
Katalunio

Pri la sigloj

Sian artikolon *Sigloj* en MONATO 2006/4, p. 5, Stefan Maul dediĉas al la mallongigoj, kiuj abundas en ĉiuj lingvoj kaj ankaŭ en nia. Li indikas, ke „ofte ili erargvidas homojn, precipe komencantojn”.

Mi deziras iom komenti la artikolon. Sigloj estas tre utilaj. Ili estas uzataj pro ekonomiaj konsideroj. En la presitaj tek-

stoj mallongigoj ŝparas spacon kaj sekve paperon kaj laboron. En la parola lingvaĵo ili ŝparas tempon. Tio estas la pozitivaĵoj. Sed ili havas ankaŭ negativaĵojn. Ili povas erarigi la leganton/aŭskultanton, se tiu ne komprenas ilin, kiel tion montras la aŭtoro per trafikaj ekzemploj. Se la leganto ne konas la siglon, por kompreni la tekston, tiu devas serĉi kielon deĉifri ĝin kaj ofte la klopodoj povas esti vanaj. Dum parolado la aŭskultanto ne havas eblon deĉifri la siglon kaj pro tio tuta frazo aŭ eĉ parto de la parolado povas esti nekomprenita.

Por eviti la negativaĵojn de la sigloj en presita teksto, necesas eĉ la unua uzo de la siglo enkrampe deĉifri ĝin. La aŭtoroj kaj la redaktoroj konsideru, ke ĉiam estos legantoj, kiuj ne scias iun siglon.

Dimitar HAĜIEV
Bulgario

Du ĝis kvar objektivemaj artikoloj

Dankon al Vilĉjo Simcock pro tio, ke li klare konfesas: „Mi neas la rajton de iu viro aŭ beatigi aŭ sanktigi homojn.” (*Aktuala religia mortigado*, MONATO 2005/12, p. 6) Tiel li konfirmas, ke li ne intencis helpi la papon per la artikolo *Sanktuloj* (MONATO 2005/3, p. 24). Tamen li studu la nuntempan kristanan vivon. Liaj artikoloj ne superas la nivelon de tradicia komunisma propagando simile al la komento *Pastropovo ekstremdekstra* de Zlatko Tišljari pri la socia influo de la katolika eklezio en Kroatio (n-ro 5, p. 8-9). Ĉu la primitiva ateisma sektopropagando instigos leganton de MONATO al iom da meditado pri religiaj aferoj?

Restas du artikoloj: tiu de Jomo Ip-felkofer *Frato Paŭlo: pacamanto?* pri la pacifista martiro Max Josef Metzger (MONATO 2005/7-8, p. 12-13) kaj *Katolika eklezio ne havas pastrojn?* de Last (MONATO 2005/12, p. 22). La aŭtoroj raportis pri kristana vivo neŭtrale. Ĉu du ĝis kvar objektivemaj artikoloj pri la katolika mondo dum la tuta jaro (el ĉirkaŭ 250 artikoloj malnete) montras, ke la *sendependa* revuo MONATO raportas pri spirita vivo ĝuste aŭ eĉ sendepende?

Josef FLIEGNER
Germanio

Lingvo-politiko: mankas unueco en la Unio

de Zlatko TIŠLJAR

La Eŭropa Komisiono proklamas egalrajtan lingvan politikon: ĉiu civitano povas oficiale uzi sian nacian lingvon kie ajn kaj ricevi dokumentojn kaj respondojn en sia lingvo. Sed praktike la komisiono elpensis principon, laŭ kiu ĉiu eŭropano devus scii krom la gepatra ankoraŭ du fremdajn lingvojn.

Tial eblas legi ĉe *Eŭrobarometro* (europa.eu.int/comm/public_opinion/archives/eb_special_en.htm), ke enketitoj al la demando, kiujn du lingvojn ili ŝatus lerni, respondis per 77 % la anglan kaj per 33 % la francan. Do estas logike, ke institucioj de Eŭropa Unio (EU) sekvu la deziron de civitanoj kaj tiel subtenu unulingvecon, kiun ili formale malaprobis.

Ĉiuj do lernas la anglan, krom angloj kaj irlandanoj, kiuj apenaŭ lernas fremdajn lingvojn. La formala lingva egalrajteco realiĝas tiel, ke en ĉiuj lingvoj oni ricevas dokumentojn kun plurmonata malfruo aŭ neniam (vidu europa.eu.int/languages, kie de novembro 2005 oni ne aperigis novajn tekstojn kaj oni atendis kvar monatojn por aperigi bazan tekston en dek malpli grandaj lingvoj).

Interpretista humoro

Eĉ tie, kie oni disponas pri interpretistoj kaj tradukistoj por ĉiuj lingvoj, ekzemple en la Eŭropa Parlamento, interpretado fojfoje entenas erarojn, tiel ke parlamentanoj emas pli kaj pli ofte uzi la anglan, por ne dependi de la humoro de la interpretistoj.

Eĉ en skribaj tekstoj sur la plej alta nivelo estas tradukprecizeco tre dubinda. Kiel sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) mi skribis leteron al Ján Figel', la komisionano pri instruado en EU, kaj starigis al li kvar demandojn rilate dokumenton, en kiu la Eŭropa Komisiono

asertis, ke „artefaritaj lingvoj ne havas kulturreferencojn”:

1. Kiuj estas, baze de tiu aserto, artefaritaj lingvoj?
2. Kiu difinis la diferencojn inter artefaritaj kaj aliaj lingvoj kaj kiel?
3. En kiu kunveno la Eŭropa Komisiono akceptis la supran tekston?
4. Se la Eŭropa Komisiono opinias Esperanton artefarita lingvo, kiu ne havas *per definitionem* kulturajn referencojn, ĉu tiokaze originalaj libroj skribitaj en ĝi, artikoloj pri sciencoj en *Vikipedio* kaj milionoj da tekstoj en Esperanto en Interreto estas fantomaj fenomenoj, kiuj ne rilatas al kulturo?

Mi ricevis respondon de lia konsilanto, sinjoro Delmolly, en la slovena, kiun ne indas traduki, ĉar mi ne komprenis ĝin. Estis galimatio de politikaj frazaĉoj kelkloke sintakse tute ne klaraj. Mi petis originalon kaj oni sendis al mi la anglan tekston, kiu ankaŭ estis ne pli bona.

Kleriga sistemo

En marto vizitis Slovenion la prezidanto de la Eŭropa Komisiono, José Manuel Barroso. Dum televida interparolo iu demandis lin, kiel EU imagas instruan sistemon, se oni deziras maksimuman interŝanĝon de scioj (ekzemple profesoroj gastprelegu kie ajn kaj studentoj studu kie ajn), sen interkonsento pri la lingvo, per kiu tio okazu. Rektan respondon Barroso ne donis, sed parolis pri egalrajteco de ĉiuj eŭropaj lingvoj kaj neceso plu havi ĝin.

Kia estas la praktiko? La homoj elturniĝas. Profesoroj ja prelegas en la angla kaj studentoj lernas kaj aŭskultas en la angla. Tiel oni daŭrigas la neformalan, sed evidente ie planitan praktikon,

kiu kondukas al neegalrajta unulingva Eŭropo, kiun oni formale kontraŭstaras.

Eŭropa Esperanto-Unio (vidu *lingvo.org/eo/2/15*) dum du jaroj registris pli ol 1000 laborpostenajn anoncojn en oficejoj de EU-administracio kaj entreprenoj financataj de EU, kiuj kondiĉigas, ke kandidatoj konu la anglan sur denaskula nivelo. Al demandoj de kelkaj eŭropaj parlamentanoj, ĉu tio estas diskriminacio, venis nea respondo.

Vendo de servoj

La raporto de profesoro Grin, laŭ mendo de la franca ministrejo pri klerigado, klare diras, ke Britio ĉiujare gajnas minimume 17 miliardojn da eŭroj pro vendo de servoj rilataj al la angla lingvo. Se oni uzus en komunaj instancoj neŭtralan lingvon, EU ŝparus 25 miliardojn kaj la gajno estus egale distribuita inter ĉiuj landoj (*lingvo.org/grin*). Riĉa Britio gajnas multegan monon de la malpli riĉaj popoloj de EU.

Kial la reganta tavolo de EU ne komprenas, ke devas ĉiuj krom du (Britio kaj Irlando), se oni volas komunikiĝi en multlingva komunumo, rezigni pri sia lingvo? Se do ĉiuj krom du, kial ne ankaŭ la privilegiitoj?

Ŝajnas, ke finfine homoj komencis pensi alimaniere. La aŭstra revuo *Der Standard* en enketo pri la plej konvena lingvo por komuna uzo en EU (la enketo diferencis de aliaj, ĉar eblis interalie voĉdoni por Esperanto), ricevis neatenditajn rezultojn. La unuan pozicion nun okupas Esperanto kun 54,8 %, duapozicie estas la germana kun 15,8 % kaj apenaŭ la trian pozicion gajnis la angla per 14,5 % (derstandard.at/url=/?id=2375931). Saĝaj politikistoj devus obei la voĉon de la popolo. ■

Reveno al la hejmlando



De At-Tajba oni ĝuas bonan panoramon ĝis Hermon-monto.

Post longa malĉeesto mi revizitis pasintjare mian iaman patrujon, Libanon. Kiam mi estis knabo en mia vilaĝo At-Tajba (La Bonklimata), en la sudo, apenaŭ rimarkeblis la 20a jarcento. Nun ĝi estas relative prospera urbeto. En la centro mi trovis mian iaman domon kun ĝia frukt-ĝardeno (malgraŭ postsigno de israela bombo sur la muro) bone prizorgata de la komunumo omaĝe al mia patro, la mulao en la regiono. Mi promenadis tien kaj reen kaj manĝis de la samaj ŝatataj fig-, granat- kaj oliv-arboj. Malmultaj samaĝuloj restas, sed la geju-nuloj varme akceptis min.

Orienten el At-Tajba oni vidas la pinton de Hermon-monto okupata de Israelo. Tuj sude de At-Tajba estas bone videbla juda vilaĝo. Kontraŭ la okupo de Israelo batalas Hizbul-Laah. Tamen miaopinie ne Hizbul-Laah forpelis Israelon de Libano sed okcidentaj potencoj, kiuj unue instigis Israelon ekokupi la landon kaj ĝin terurigi dum pli ol du jardekoj.

Masakroj

Nun la ĉefa rolo de Hizbul-Laah estas helpi la popolon de la sudo de Libano reakiri sian egalecon kun la nordo. Alia rolo estas protekti la popolon kontraŭ eblaj masakroj, kiel tiuj de Sabra kaj Ŝatella en 1982. Samtempe la okcidentaj potencoj bezonas Hizbul-Laah-on, por ke Israelo restu ĉiam veka, armita kaj preta ataki.

Pasintjare estas mortigita la iama ĉefministro de Libano, Al-Hariri. Tiu ĉi fariĝis milionulo, sed liaj riĉoj ne restis en Libano kaj la lando apenaŭ profitis de liaj projektoj. Li konstruigis plej modernan flughavenon en Bejruto kaj ŝoseojn por turismo. Lokaj komercistoj kolektis la profitojn kaj resendis ilin al okcidentaj bankoj.

Plue, Al-Hariri starigis fonduson por finance subteni libanajn studentojn en okcidento kaj ilin poste revenigi. En 1996 mi renkontis lin en Londono kaj demandis, kiom da studentoj fakte revenas hejmen.

Li promesis esplori kaj faksigi respondon, sed nenium mi ricevis.

Strategio

Ankaŭ Sirio estas parto de la okcidenta strategio pri Libano kaj la regiono. En 1976 okcidentaj potencoj petis, ke Sirio eniru Libanon por „protekti kristanojn” dum la interna milito (1976-1991). La armea ĉefo ricevis 50 milionojn da dolaroj, nun investitaj en Londono. Tiuj samaj potencoj postulis pasintjare la reirigon de la siria armeo al Sirio, verŝajne por ke la armiloj troviĝu en pli malgranda tereno kaj, se necese, estu pli facile detrueblaj.

La kristana elito estas la plej lerta tavolo de libana socio. Tamen oni trompe kredigas eĉ al ĝi, ke Okcidento estas iel ĝia „patrino”. Se vere la okcidenta Francio kompatus Libanon, ĝi estus helpecele interveninta por eviti la buĉadon dum la interna milito. Kaj nun la kristanoj kondamnas Sirion kiel okupanton kaj subpremanton de Libano.

Apenaŭ mirige estas, ke tiom da ambiciaj junuloj forlasas Libanon, lasante hejme junajn virinojn, kiuj mem atendas eksterlandajn svatantojn.

Husejn AL-AMLY/pg

ALBANIO

Protestas Ĉinio

Komence de majo alvenis al la flughaveno en Tirano kvin ĉinaj civitanoj kun ujugura nacieco, kiuj – akompanataj de advokato usona – tuj petis azilon. La kvinopo, akuzita pro terorismo, pasigis kvar jarojn en la usona prizono de Guantánamo en Kubo, sed antaŭ unu jaro usona juĝejo deklaris la ujugurojn nekulpaj. Ŝajnas, ke la pakistana armeo „vendis” ilin kontraŭ 5000 eŭroj al usonanoj.

Kvar jarojn la ujuguroj apenaŭ povis kontakti siajn familianojn, kaj dum longa tempo la usonaj aŭtoritatoj vane negocis kun 20 ŝtatoj por akirigi al la ujuguroj politikan rifuĝejon. Finfine Albanio akceptis ilin.

Tio tamen vekis diversajn reagojn en- kaj ekster-lande. Unuavice la ĉina registaro forte petis, ke Albanio reirigu la kvinopon al Ĉinio. Tie la kvin ujuguroj estas konsiderataj teroristoj, ĉar ili apartenas al militista organizaĵo por li-



PETTY OFFICER 1ST CLASS SHANE T. MCCOY, U.S. NAVY, VIKIPEDIA

Arestitoj en Guantánamo, la 11an de januaro 2002

berigi Orientan Turkestanon, kiun ĉinoj nomas Xīnjiāng, delonge aneksitan de

Ĉinio. Tiucele Ĉinio diplomatie protestis ĉe la albana ministrejo pri eksteraj aferoj kaj nuligis kelkajn oficialajn vizitojn al Albanio.

Sankta leĝo

Sed albanoj restis ĉe sia sankta neskriba leĝo popola, kiu malpermesas al dommastro enmanigi al fremduloj la neinvititan gaston, eĉ se tiu estus malamiko. Krome analizistoj memorigis, ke la ujugura popolo batalas por liberigi sin de la longtempa jugo de Ĉinio, same kiel ĉeĉenoj en Rusio. Sekve ilin oni ne povas konsideri teroristoj.

Iam en Kosovo batalantoj de la Liberiga Armeo komence estis konsiderataj teroristoj, eĉ de usonaj politikistoj, kvankam la tiea milito ne estis etna, sed liberiga. Intertempe la kvin ujuguraj rifuĝintoj vivas komforte kaj kontente en Babru, apud la ĉefurbo Tirano.

Bardhyl SELIMI

Ankaŭ ĉi-jare MONATO havos sian kutiman budon en la ĉefa halo de la Universala Kongreso de UEA en Florenco. Vizitu ĝin por peti informojn, (re)aboni aŭ por (sen bankaj kostoj) pagi viajn ŝuldojn!

HUNGARIO

Konvinka venko

Antaŭ du jaroj la kabineto staris antaŭ fiasko kaj senkuraĝiĝo. Tamen la nova ĉefministro Ferenc Gyurcsány [djurĉanj] energie laboris, tiel ke antaŭ la ĉi-jara balotado egale staris laŭ opiniondoj la reganta koalicio kaj la opozicio. Fine venkis la koalicio eĉ pli konvinke ol antaŭ kvar jaroj.

La balota sistemo de Hungario similas al la germana. Hazarde ankaŭ la partioj iom similas: du grandaj partioj kaj kelke da satelitoj. Antaŭ la unua balottrondo okazis debatoj dissenditaj en radio- kaj televidaj kanaloj. La



Viktor Orbán en la parlamento de Hungario

ĉefministro parolis pri la estonteco, dum Viktor Orbán, estro de la dekstra ligo, atentigis pri la eraroj kaj la pekoj de la pasinteco. La estrino de la malgranda dekstra partio MDF Ibolya

[Iboja] Dávid kaptis atenton pro sia aspekto: ruĝa vesto kaj blonde farbita hararo.

Avantaĝo

En la unua balottrondo la rezulto estis preskaŭ la sama kiel antaŭ kvar jaroj. La socialistoj atingis etan avantaĝon, ricevinte 71 mandatojn. La dekstra ligo ricevis 69, liberaluloj 4 kaj MDF 2. Post tiu ĉi balottrondo Gyurcsány faris pakton kun la liberaluloj por daŭrigi la koalicion. Kandidatoj de ambaŭ partioj reciproke rezignis por helpi unu la alian kaj kune kampanji.

Aliflanke Orbán petis Dávid-on unuigi la fortojn. Dávid starigis ok postulojn, i.a. ke Orbán retiriĝu, por ke la ĉefministro-kandidatino estu Dávid. Voĉdonontoj konstatis, ke maldekstre prezentiĝis interkonsento, programo kaj kandidato; dekstre male (Orbán ja retiriĝis).

Sukceso

Tial la dua balottrondo portis grandan sukceson por la koalicio. Sen voĉoj el eksterlando la socialistoj akiris 190 seĝojn kaj la liberaluloj 20. Jen komforta plimulto, ĉar Orbán gajnis nur 164 seĝojn kaj Dávid 11.

La malnova-nova kabineto havas du neprokrasteblajn farendaĵojn. Ĝisaŭtune oni devas prezenti programon al Eŭropa Unio por malpliigi la buĝetan deficiton. Poste ĝi devas fronti al konsilantaraj elektoj.

JUHÁSZ Károly

ALBANIO

Post bendo – fendo

Jam de 1997 Spartak Ngjela [nĝela] aktivis en la albana reganta Demokratia Partio, dum kelkaj monatoj precipe kiel ministro pri justico en la tiel nomata registaro de nacia saviĝo, ĝis venkis la socialistoj. Li estas filo de ministro pri komerco en la reĝimo de la albana diktatoro Enver Hoxha [hodĵa] kaj laŭprofesie advokato.

En julio 2005 li estis elektita kiel deputito, sed la nova ĉefministro ne metis lin en la registaron. Anstataŭe Ngjela ricevis partiajn kaj parlamentajn postenojn, fariĝante komisionestro pri leĝaro. Tamen li kontraŭstaris registarajn klopodojn elradikigi korupton (unu el la kialoj pro kiuj Albanio ankoraŭ ne estas akceptita de internaciaj instancoj kiel Eŭropa Unio aŭ Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo).

Opozicio

Ngjela argumentis, ke ekzemple

ŝanĝi la metodojn por elekti membrojn de sendependaj ŝtataj institucioj aŭ enkonduki elektronikan voĉdonadon en la parlamento kontraŭas la konstitucion. Lia konduto vekis admiron ĉe la opozicio socialista, sed seniluziigis liajn estrojn en la Demokratia Partio.

Rezulte Ngjela aperis antaŭ partiestroj por klarigi sian starpunkton. Li akuzis la ĉefministron Sali Berisha pri blokado de ŝtata kaj ekonomia projektoj surbaze de kontraŭkonstitucia agado. Li aldonis, ke Berisha kaj du aliaj ministroj estas eks-komunistoj, kiuj daŭre agas laŭ komunisma pensmaniero.

Ngjela kaŝe registris la debaton kaj la sekvan tagon donis la bendon al televida kompanio. Jen la unua fojo ekde 1990, ke neformalaj diskutoj estas kaŝe registritaj. Tiel rompiĝis la pacienco de la Demokratia Partio, kiu eksigis sian disidenton.

Bardhyl SELIMI

NATURO

Kribrilo mortiga

Ekde 1991 en Aŭstrio kaj ĉirkaŭaj landoj la minista tineo (*Camreraria ohridella*) ĉiun someron brunigas la foliojn de hipokaŝtanoj. La parazito, havante en la jaro tri ĝis kvar generaciojn, rapide plimultiĝas, tamen pro ĝi mortis ĝis nun neniu arbo.

Nun alia papilio mortige minacas la aleo-arbojn en Vieno. La blukribrila raŭpo (*Zeuzera pyrina*) atakis centojn da arboj, precipe fraksenojn. La damaĝulo disvastiĝis ĉefe en la jaro 2003, kiam la somero estis tre varma. Multe da arboj estas nun tiom malfortaj kaj falemaj, ke oni devas forsegi ilin. Por neniigi la raŭpojn oni bruligas la lignon kaj replantos aliajn, pli rezistemajn aleo-arbojn.

Walter KLAG/pg



La blukribrila raŭpo: papilio, kies beleco kaŝas mortigan minacon.

TOGOLANDO

In-iciato kontentiga

Projekto por restigi knabinojn ĉe lernejoj en Togolando montriĝas sukcesa. Tradicie knabinoj ne tiom bone instruiĝis kiom knaboj kaj do malmultas virinoj ekzemple en ofiĉaj kaj registaraj postenoj. Abundas la kialoj: gepatroj favoras siajn filojn, kredante, ke filinoj laboru surkampe aŭ prizorgu aliajn infanojn; patroj neglektas siajn filinojn, ne sufiĉe atentante pri iliaj bezonoj; kaj fojfoje knabinoj suferas ĉe lernejoj pro seksa ekspluatado.

En 1996 Togolando iniciatis kunlaboran programon aprobitan de la infana fonduso de Unuiĝintaj Nacioj (UNICEF) por eduki kaj knabinojn kaj gepatrojn. La celoj estis altigi je 80 % la enskribiĝon de knabinoj en la vilaĝaj lernejoj, kie efektiviĝas la programo. Por subteni la iniciaton, la registaro fiksis la koston de knaba instruado ĉe el-

ementa lernejo je 1400 okcidentafrikaj frankoj (213 eŭroj), de knabina instruado je 1000 frankoj (152,50 eŭroj). La koncernitaj vilaĝoj profitis alimaniere, ricevante diversajn ekipaĵojn, inkluzive de kajeroj kaj skribiloj, kaj ankaŭ infanvartejojn.

La rezultoj estis kontentigaj. Pli da lernantinoj restis ĝis la lasta klaso kaj la registaro decidis pli vaste apliki la originalan programon. Notindas, ke gepatroj ne tiom ŝarĝis siajn filinojn, dividante kun ili tradiciajn taskojn. Ankaŭ aliaj organizaĵoj kontribuis al la sukceso de la projekto, tiel ke estas konstruitaj klasĉambroj ankaŭ por pli aĝaj lernantoj. Tiuj ĉi organizaĵoj, i.a. Rotario kaj Leonkluboj, finance subtenis gelernantojn kaj trejnadon de instruistoj.

SAGBADJELOU Kokou/pg



LORENZ KHAZALEH

SEPA: la fina fazo de la enkonduko de eŭro

Por multaj eŭropanoj la uzo de eŭro-monbiletoj kaj moneroj iĝis tute normala afero. Por eŭro-pagoj per banko kaj per karto jam iom estas realigite, sed vera eŭro-zono ekzistos nur ekde la jaro 2010.



La sistemo por malmultekoste kaj fidele ĝiri monon al alia lando de la eŭro-zono relative bone funkcias. La ĉefaj restantaj problemoj ŝajnas esti la kostoj (kiuj teorie ne estu pli altaj ol por enlanda pago) kaj la tre

longaj kaj komplikaj internaciaj kontonumeroj kaj bankokodoj.

Pagi per kreditkarto, kiel *Visa* aŭ *MasterCard*, proksimume funkcias kiel antaŭe. Tiu metodo iĝas pli sekura, ĉar iom post iom la subskribon anstataŭas

persona kodo. Tamen, ĝi restas multekosta por la komercistoj, kiuj devas pagi procentaĵon al la kreditkarto-kompanioj. La uzanto ricevas la konteltirojn nur la sekvan monaton. Tiel li ĝuas monaton da pagoprokrasto, sed aliflanke li ankaŭ nur post monato ekscias pri ebla misuzo de sia karto. Ankaŭ akiri kontantan monon per kreditkarto ofte multe kostas. Pli racia kaj enlande kutime uzata estas la debetkarto. Ĝi funkcias nur per persona kodo kaj elspezoj per ĝi estas tuj subtrahataj de la kontosaldo. Ĝia uzo ekster la hejmlando (per la *Maestro*-sistemo) ne ĝenerale eblas.

La alstrebata celo nomiĝas SEPA, mallongigo de la angla *Single Euro Payments Area* (proksimuma traduko: unuigita eŭro-pagzono). Laŭ la nunaj planoj komence de 2008 ĉiuj bankoj de la eŭro-zono kapablu prilabori ne nur transŝtatajn eŭro-ĝirojn, sed ankaŭ pagojn per kartoj kaj aŭtomatajn enkasigojn (de periode ripetiĝantaj pagoj, kiel elektro, abono k.s.). Komence de 2010 la enlandaj kaj eŭro-pagsistemoj integriĝu, tiel ke por civitano ne plu rimarkeblas diferenco inter enlanda kaj SEPA-pago.

En iuj landoj la pagsistemo jam estas tute aŭtomatigita kaj ne estos bezonataj grandaj investoj. En aliaj landoj eĉ ne ekzistas racia enlanda interbanka pagsistemo kaj la defio estas grandega. SEPA ne pritraktos ĉekojn; ili estonte uzeblis nur enlande kaj verŝajne baldaŭ tute malaperos.

Eblas observi la progreson de la SEPA-projekto per la retejo de la Eŭropa Centra Banko, www.ecb.int/paym/pol/sepa/html/index.en.html.

Roland ROTSAERT

IRLANDO

„Kara antikva malpura Dublino”



DENNIS SCHIBLI

Tiel la loĝantoj de la irlanda ĉefurbo ofte nomas sian urbon. Certe, al ĉiuj dublinanoj ĝi estas *kara*. Ĝi estas ankaŭ *antikva*. Laŭ la *Analoj de Ulstro*, en la jaro 841 la vikingoj establis okaze de rabekskurso kampadejon en Dubhlinn (nigra lageto) ĉe la estuaro de la rivero Liffey (irlande: *An Life*, kio pli bone indikas la prononcon). En 902 la irlandanoj elpelis la vikingojn, kiuj tamen revenis tien komence de la deka jarcento, sed ĉi-foje strebis pli por komerci ol por rabi.

En la mezepoko Dublino ne plu estis simpla vikinga kolonio, sed iĝis jam pluretna kaj plurlingva urbo, en kiu oni paroladis la norenan

(skandinavan), irlandan kaj anglan lingvojn. La irlandanoj nomis la urbon je la nomo de monaĥejo apud la suda riverbordo: *Baile Átha Cliath* [balje oha klia].

Sed ĉu justas priskribi ĝin kiel *malpuran* urbon? Ĝis la komencaj jardekoj de la 20a jarcento la kvartaloj de malriĉuloj en la urbocentro estis ofte malpuraj kaj mizeraj. Tamen tiu situacio draste pliboniĝis, kiam la magistrato malkonstruis la sordidajn apartamentojn

kaj konstruigis pli bonajn domarojn, kvankam ĝia urba planado ne ĉiam sukcesis. Plie, ne ĉiuj loĝantoj respektas la neceson zorgi pri la pureco kaj bonordo de la stratoj.

Malgraŭ la malriĉeco de la plimulto de la dublinanoj en la pasinteco, la maljunaj civitanoj ofte parolas kaj kantas pri „Dublino en la raraj antikvaj tempoj”, kiam superregis ĉarma etoso, spirito de najbareco, manko de gravaj krimoj kaj la fama „craic” [krak] (vigla konversacio kaj amuzaĵo tradiciaj). ▶

CLARISSA PETERSON



CHIARA FORTUNATO




CHIARA FORTUNATO

► La hodiaŭa Dublino estas moderna kaj progresanta urbego, en kiu oni ĉie trovas atestojn pri nova riĉeco kaj mondaneco. Kie en la pasinteco oni vida-dis farmbestaron kaj tirĉevalojn sur la urbaj stratoj, oni nun observas luksajn kaj modestajn aŭtomobilojn, novajn rapidajn tramojn kaj elektran fervojreton, ligantan la urbocentron kun la antaŭurbo. Kiel en multaj aliaj urbegoj la konstante kreskanta trafiko estigis

gravajn transportproblemojn, kiujn la konstruo de larĝaj aŭtoŝoseoj kaj novaj pontoj ne sukcesis solvi. Tamen Dublino kaj Irlando de la nova jarmilo estas allogaj lokoj kaj por loĝantoj kaj por vizitantoj.

Mi apartenas al grupeto da geamikoj, kiu en la unua sabato de ĉiu monato kunvenas en la urbocentro por ekskursi, konatiĝi kun eksterlandaj gastoj kaj konversacii en la lingvo de

iu movado, kiun ni ne aŭdacas menciigi sur la paĝoj de tiu nemovada magazino. Kvankam tiuj renkontiĝoj jam okazis dum pluraj jaroj, ni ĉiam sukcesas trovi ion novan por fari aŭ viziti. Laŭ



DENNIS SCHIBL



nia sperto Dublino proponas senfinajn eblojn por interesi, distri kaj amuzi.

Krom la normalaj vidindaĵoj, kiujn oni trovas en iu ajn urbego: internaciajn restoraciojn kaj vendejojn, muzeojn, pinakotekojn, bibliotekojn, amuzejojn, teatrojn, kinejojn ktp, la irlanda ĉefurbo havas kelkajn el la plej belaj parkoj kaj ĝardenoj en Eŭropo. La plej vasta estas *Phoenix Park* [finiks] (irlandlingve: *Páirc an Fhionnuisce*), laŭdire unu el la plej grandaj fermitaj urbaj parkoj en la mondo. En ĝi estas zoologia ĝardeno, antikva historia domo apud informcentro por vizitantoj, rezidejoj de la irlanda ŝtatprezidanto kaj de usona ambasadoro, sidejo de la *Garda* (polico), muroj de malnova fortikaĵo, lago, arbaroj kaj gregoj de cervoj. Je la okcidenta flanko de la parko estas alia bela bieno kun domo, en kiu okazas koncertoj, prelegoj ktp.

Alia bela parko estas la botanika ĝardeno. En la urbo troviĝas ankaŭ diversaj duonkaŝitaj ĝardenoj kaj ĝardenetoj. Krom la dublina kastelo, en kiu troviĝas la fama orienta librokaj manuskripto-kolekto de biblioteko Chester Beattie, oni povas viziti aliajn kastelojn kaj belajn konstruaĵojn: par-



THORSTEN POHL, WIKIPEDIA

lamentejojn nunan kaj antaŭan (la „ĉambro de la lordoj” en la hodiaŭa Banko de Irlando), la universitaton Trinity, kiu konservas la valoregan Libron de Kells (nomatan la plej bela manuskripto en la mondo), Vikingan Dublinon (bedaŭrinde ne sufiĉe konservitan de la urba konsilantaro). En la nacia koncerthalo oni povas ĝui la muzikarton de orkestroj, muzikistoj, kantistoj kaj ĥoroj irlandaj kaj eksterlandaj. La dublinaj muzeoj posedas la plej valoregajn keltajn kaj antaŭkeltajn arkeologiajn eksponaĵojn. Tiuj, kiuj interesiĝas pri la irlanda (gaela) lingvo, trovos kafejojn, klubojn kaj librovendejojn, kie gaelparolantoj renkontiĝas.

Kvankam konsiderata ekde la koloniaj tempoj kiel ĉefe anglalingva urbo, Dublino havas multe da gaelaj lernejoj kaj institucioj, kaj ties nombro konstante pliiĝas pro postulo de la gepatroj, ke ties familioj estu gael- kaj plur-lingvaj.

Tre proksime al la urbo situas la belegaj Dublin- kaj Wicklow-montaroj (gael: *Cill Mantáin*), Bull-insulo, la pitoreska duoninsulo kaj la haveno Howth (gael: *Binn Éadar*), plaĝoj, arbaroj kaj lagoj. Neniu devas enui en Dublino – urbo de muzikistoj, poetoj kaj mondfamaj verkistoj.

Garbhan MacAoidh

La velka rozo

Estis nur tri vortoj, kiujn li revis aŭdi, kaj nur de unu persono. Sed eĉ la vespera vento ne blovus la vortojn en lia direkto, kiam li solece promenis. Kien li iris? Neniu sciis. Plejble ankaŭ li ne sciis, ĉar lia mieno montris, ke li ne havas celon.

Homoj ĉiam deziras pluki kaj meti ilin en la manojn de iuj kiel demonstracio de amo. Sed nun li ne povis fari tion. Multfoje li jam diris al ŝi, kiel li sentas. Li jam esprimis sian esperon, ke ili povos kunesti dum jarmiloj. Tiu belulino, kvazaŭ ŝi posedus la tutan

prokus lian senton eĉ unuprocente. Sed ŝi sentis nenion kaj ĉiam diris al li, ke li iom atendu kaj esperu.

Li klinis sin por pluki rozon, kiun li neniam povos meti en la manon deziratan.

Li memoris tiun ludon, per kiu oni povas esplori pri amo. Tio estas tro superstiĉa kaj naiva. Li ne kredis al ŝanco aŭ al iu ajn afero, kiun oni ne povas kalkuli per matematika precizeco. Kaj tia estas amo. Se li povus tiel kalkuli aman senton, li ne havus tiom da zorgoj, li nur kalkulus kaj tuj sciis la elirejon el tia situacio. Sed nun li, pro manko de alia maniero solvi la problemon, decidis esplori la senton de la belulino per la ludo, kiu ĝis nun estis al li sensencaĵo.

La rozo havis multajn petalojn, kaj li sciis, ke la lasta estas tre grava, ĉar tiu determinos lian sorton rilate la aferon. Diradi „ŝi min amas” kaj „ŝi ne amas min”, deŝirante unu petalon dum ĉiu diro. Tio estas sensencaĵo! Li forĵetis la rozon rezigne kaj serĉis konsolon sub iu arbo, sed la arbo proponis nenion, ĉar tute mankis al ĝi folioj. Tamen ne necesis beno de ombro en tiu tempo, ĉar jam vesperiĝis, kaj la suno jam ekripozis en la patrineca sino de la horizonto. Tamen, li sidiĝis sub ĝi kaj ripozigis sian dorson kontraŭ ĝi kaj fermis siajn okulojn. Tio tute ne helpis. Li ne povis elpensi bonan solvon al sia problemo. Eble tiu ludo helpus, sed li ne volis reiri por trovi la forĵetitan rozon.

Kun la okuloj ankoraŭ fermitaj, li stariĝis kaj permane sentis la trunkon de la arbo. Laŭ la sento, la arbo jam perdis la lastan folion eble antaŭ tri jaroj, sed ĝi ankoraŭ havas branĉojn. Ankaŭ li trovis, ke la arbo ne estas tre alta. Eble per tio li povas diveni sian sorton. Li provos ...

„Ŝi amas min”, li diris, deŝirante unu tre sekan branĉon. „Ŝi amas min ne”, kaj per tio li deŝiris alian.

Sed certe li volis iri for de iu ajn homo, kaj jam post 30 minutoj de sencela promeno li sukcesis. Li ekvidis bele freŝajn rozojn, sed nun ne povis renkonti ilin kun la rideto, kun kiu homoj kutime renkontas rozon. Ŝajnas, ke ili nur profundigas lian solecon.

povon dikti lian sorton, nur fojfoje diris, ke ŝi bezonas tempon por pripensi la aferon. Ĉu mankas al ŝi koro? Kiel ŝi ne povas senti la tremon kaj doloron en lia koro? Kial ŝi ne scias, ke tia prokrasto mortigas homon tre rapide? Estus bona novaĵo por li, se ŝi reci-



PEGGY GREEB, WIKIPEDIA

Nun li ne bezonis, ke oni diru al li, ke li estas freneza. Li mem sciis, ke li jam perdis la kapablon rezoni aŭ pensi normale, sed li jam ne povis agi alie. Li deŝiris alian branĉon: „Ŝi amas min.”

Li ekploris. Li ne sciis, kiom da branĉoj restis, kaj nun la ludo fariĝis danĝera, ĉar la branĉoj dum ĉiu deŝiro preskaŭ vundis lin. Fine li trovis, ke lia mano povis tuŝi nur unu restantan branĉon. Li jam pensis pri tio, ke ŝanco neniam favoros lin. Li ne ludos la ludon. Nu, li deŝiris la lastan branĉon kun la diro, kiu eskapis el lia buŝo nur kiel profunda ĝemo, kaj en absoluta malespero li tute ne sciis, ke la lasta branĉo estis akompanata de granda branĉo, kiu jam multajn jarojn pendis sur alia najbara arbo, kaj la celo de la malbeninda branĉo estis lia kapo.

Tiun saman vesperon la belulino ordigis aferojn en sia eta salono. La nokto estis tre profunda, kaj oni havis la penson, ke la suno ne leviĝos dum jarcento. Ankaŭ pluvis.

Li aperis en la enirejo de la loĝejo de la knabino, kiun li amis kun ekstrema amo. Ŝajnis, ke li nun jam trovis manieron solvi la problemon kaj trovis, kion diri por igi ŝin deklari sian amon al li. Li nun ne ploris, sed lia malĝojo estis eĉ pli evidenta ol antaŭe. Li la freŝajn rozojn en siaj manoj donos al ŝi kaj diros, ke ili signas lian amon al ŝi. Kiam ŝi turnis sin en lia direkto, li tuj genuiĝis kaj, levinte la rozojn, li solene diris: „Bonvolu diri al mi nun, kiel vi sentas pri mi, mia pacienco elĉerpiĝis, kaj mi rapide mortas.”

Sed je lia surprizo ŝi diris nenion, nek rigardis la rozojn. „Ĉu do vi ne amas min? Ĉu do vi nur igis min atendi senfrukto?” Ŝi ŝajne ne konsciis pri lia ĉeesto. Neniu povis esti tiom malbonkora. Subite la telefono sonoris, kaj ŝi tuj prenis la aŭskultilon kaj ricevis mallongan informon. Ŝi ne povis reloki la aŭskultilon, kaj ŝi falis sur la plej apudan sidilon.

„Kio? Ĉu vi estas laca?”

Sed ŝi ne respondis.

„Vi jam tute ŝanĝiĝis. Nun vi eĉ ne alparolas min.”

Kion li sole faris tie? Kiel tio okazis?

Kiu? Kio okazis?

La belulino kliniĝis kaj ekploris. Tiu-momente li rigardis la rozojn en siaj manoj kaj trovis, ke ili estis senvivaj. „Ho ve! Neniu ricevos ilin. Kaj kiel mi ne tuj sciis, ke ili velkis? Pardonu!” Nun plorante laŭte, la belulino stariĝis kaj ekpromenis en lia direkto, sed montrigis, ke ŝi tute ne vidas lin.

„Ho, ĉu ŝi ne vidas min? Ve, kio

okazas?” Li ĵetis la velkajn rozojn sur la plankon. „Nun ne utilas deklari amon al mi.” Ekstere en la profunda nokto homoj amasiĝis, klaĉante pri junulo, kies kadavron oni ĵus alportis al la najbara hospitalo. „Alia rozo jam velkis!” oni diris.

Bunmi OSHO-DAVIES

Mortis Izabel Santiago

En Roterdamo forpasis la 13an de majo Izabel Cristina Oliveirra Santiago [izabéŭ kristina olivejra sanĉiagu], multjara redaktoro, revizianto kaj redakcia sekretario de MONATO.

Izabel Santiago naskiĝis en Rio-de-Ĵaneiro en 1959, kiel filino de portugalo el Avejro. Ŝi estis magistrino pri antropologio kaj psikiatro, sed tiun profesion ŝi nur mallonge praktikis pro prietikaj malkonsentoj kun siaj kolegoj medicinistoj. Ŝi instruis Esperanton en sia hejmurbo kaj gvidis muzikan programeron en radio *Imprensa-FM*. Ŝian Esperanto-kurson *O Que é Esperanto* (Kio estas Esperanto) publikigis la ne-esperantista eldonejo *Editora Brasileira*.

En 1989 ŝi venis al Eŭropo por volontuli ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA). Tuj poste ŝi estis varbita de Paul Peeraerts por kunlabori en la internacia skipo de reviziantoj de MONATO. Kvankam ŝi laŭ instruiteco ne estis lingvisto, ŝi montris tre grandan kaj profundan konon de la lingvo. Ŝi posedis escepte delikatan lingvan senton pri Esperanto. Ŝia lingvoregado montriĝis, kompreneble, en la diskutoj pri detaloj en la lingvaĵo de MONATO-tekstoj, sed ankaŭ estis ĝuinda tio, ke ŝi kapablis pri subtile humura sinesprimado per rimedoj de la lingvo.

En 1994 Izabel Santiago transprenis la redaktadon de la rubriko *Kuirado* de MONATO, en 1995 ŝi ini-

ciatis la novan rubrikon *Mozaiko* (por legantoj, kiuj preferis mallongajn artikolojn) kaj en 2000 ŝi transprenis la redaktadon de la rubriko *Scienco*. En aŭgusto de 2001 ŝi devis „provizore” demisii de siaj funkcioj pro familiaj kialoj, sed ŝi bedaŭrinde neniam povis repreni siajn taskojn.



Ŝiaj amikoj memoros ŝin kiel teneran kaj precipe tre sentivan homon. En sia privata vivo Izabel Santiago estis ĉiam serĉanta la veron: la veron en la interhomaj rilatoj, sed ankaŭ la veron en la naturo, la veron pri morta kaj postmorta vivo. Tiu scio pri postmorta vivo verŝajne igis ŝin decide rifuzi kuracistan helpon kaj medikamentojn en la lastaj tagoj de sia vivo.

La unua Zamenhof-monumento de la 21a jarcento: dika Pomego!

Senkaŝa sinnudigo

Ĉe serioza recenzisto oni supozas objektiveton aŭ almenaŭ strebadon al ĝi. Sed recenzi prilingvan libron estas, verŝajne, la plej tikla ekzerceto, ĉar neniu kapablas esti tute objektiva pri tio; ĉiu havas propran sintenon, plej bone scias kaj juĝas sin plej kompetenta pri sia lingvo. Luj – inter tiuj estas mi – pensas, ke la fundamenta gramatiko estas kompleta kaj sufiĉa, aŭ ke ĉiu gramatika problemo estas reduktebla al ĝi; aliaj, ke la vera esperanta gramatiko troviĝas en aliaj nunaj aŭ estontaj dikaj libroj.

Povas esti utile reemfazi, ke unu el la malmultaj karakterizoj, kiuj distingas planlingvon disde naciaj lingvoj, estas la fakto, ke en la planlingvoj la gramatiko ekzistas antaŭ la lingvo mem, la gramatiko naskas la lingvon. Kontraŭe, en la naciaj lingvoj la gramatiko estas klopodo kapti la ekzistantan (skriban aŭ parolan) lingvon en korseton da reguloj, kiuj tiel faciligas la lernadon de tiu lingvo. La gramatiko vere ne estas produkto de la Bona Dio, kaj Bertilo, verŝajne, konsentos, krom se li havas sekretajn ambiciojn pli altajn ol mi supozas. Do, ĉe ni ankaŭ postfundamenta gramatiko povas ekzisti, interalie kiel priskribo de fakta lingvouzo, kiel priskribo de la praktika solvado de tiklaj kazoj, de problemetoj, kiuj ne eksplicite estas traktitaj en la baza gramatiko! Cetere, mi konas kaj ofte (re)legis la lingvan respondon 140an, kie Zamenhof klare esprimas sian scion, ke ĉiam la homo kapablos lingve serpentumi.

Ĉu ne jam li diris en *Proverbaro*, ke plena objektiveto ne estas de tiu ĉi mondo? Se ne ... li hazarde forgesis diri.

Konklude: Sentu vin tute libera malakcepti mian vidpunkton, mi klopodos,

tamen, honeste balanciĝi kaj rigardi ambaŭ pesiltelerojn.

Strategio

Por verki kompletan analizan recenzon mi bezonus, kompreneble, pli da spaco ol la tutan dikan *Pomegon*. *Pomego*??? Nu, ja, klare la aŭtoro instigas nin – ĉu modeste, ĉu ruze? – nomi sian gramatikon *Pomego*. Li diras tion en la teksto, sed ankaŭ pere de bildo sur la librojaketo kaj durkovrilo. Estu tiel! Li sekvas tie la Zamenhofan regulon, ke *lingvo absolute logika kaj tute sen idiotismoj estus lingvo serviva kaj tro peza*. Mi supozas, ke la termino jam enradikiĝis per la elektronika versio.

Mia aliro estos jena: mi elektis kelkajn lastatempe renkontitajn gramatikajn ĝenaĵojn kaj esploros, ĉu ili estas traktitaj en la *Pomego*, kiel ili estas traktitaj kaj ĉu ili estas facile kaj rapide elfoseblaj, sen ke oni por tio trafolumu la libron dum kelkaj horoj. *Pomego* ja nepre devos esti tia konsultverko, pli ol studlibro.

Nepraj helpiloj kaj gvidiloj do devas esti la enhavtabelo kaj la eventuala indekso. Kaj? Trifoje haleluja! Due, ĉar tuj estas al mi klare, en kiu paĝo mi espereble trovos miajn ses respondojn, trie, ĉar la indekso, tre ampleksa kaj klara, konfirmas mian supozon, kaj unue – nun eĉ Haleluja majuskle – ĉar Bertilo regalas nin per gramatiko, adaptita al, kaj deduktita el, ĝia lingvo! La terminologio estas logika kaj klara ... li uzas la ankaŭ PIV-ajn terminojn *o-vortoj*, *a-vortoj*, ... traktas *rolmontrilojn*, *kunligajn vortojn*, *frazrolojn*, *difinajn vortojn*. Luj terminoj do estas nur en Esperanto-gramatiko uzeblaj, kaj jen, tiel devas esti! kaj devus esti ankaŭ por naciaj lingvoj, anstataŭ facilanime

ĉion vole-nevole konstrui surbaze de klasika gramatiko, taŭga nur por klasika lingvo. En la libro troviĝas – ĉu por kontentigi pedantulojn? – gramatika vortareto, kie oni retrovos ankaŭ la tradiciajn terminojn.

Ĉu ne jam la majstro diris en *Proverbaro*: *inter esperantistoj krii esperante? Se ne ... li hazarde forgesis*.

Konklude: Kiel li promesis, la libro ne estas nur por specialistoj, sed por ĉiutagaj esperantistoj. Tamen ankaŭ specialistoj trovos laŭ sia(j) gusto(j).

Elparolo

Iom antaŭe mi uzis la vorton „enhavtabelo”. Persone mi preferas enhavotabelo, ĉar plejmulto de la esperantistoj prononcus la sentransvokalan vorton kiel *enhaustabelo*. Tio ne tro gravas, ĉar ĝi ne kondukas al iu ajn miskompreno, kaj naŭdek elcentoj de la parolantoj eĉ ne kapablas kompreni aŭ eĉ akcepti, ke ili prononcas ne v sed f, kiel tre multaj daŭre eldiras *set*, *sup* kaj *aput* kaj ili eĉ restas konvinkitaj, ke ili klare diris *sed*, *sub* aŭ *apud*. Ŝajne, Zamenhof sciis tion, kaj tamen enkondukis la vorton *absolute* kaj ne *apsolute* (aŭ *abzolute*). Kialoj pravaj estas facile diveneblaj.

Tamen min ĝenas *zub*, *zed/zet*, *zupo*. Ĝenas min, ke iuj manĝas la *zupon*. Kion diras *Pomego*? Nu, ĝi *konstatas*, ke tiaj elparoloj uziĝas; diras, ke iuj estas negustaj sed praktike akceptataj, ĉar ili ne kaŭzas miskomprenojn ... kaj por iuj kazoj *konsilas* eviti ilin. Klare *Pomego* diras, ke *por tio ne ekzistas reguloj* kaj ke oni faru laŭplaĉe. Eble iom tro pragmatisma sinteno, eble tro facila submeto al la homa facilamo? Oni foje komparu la nunan esperantan prononcon de iuj popoloj kun la antaŭa! Aliflanke, mi, ta-

men, ne pensas, ke tiun progreson ni dankas al severaj reguloj.

Traktitaj estas ankaŭ kromakcentoj, distingaj paŭzetoj, duoblaj literoj, mal-longigoj kaj elparolo de ne-esperantaj vortoj. Mi ne trovis, bedaŭrinde, traktadon de la ebleco de transira o-vokalo en kunmetitaj vortoj, por eviti, ke esperantistoj parolu *montlingvon* (kun t, kaj plej ofte sola akcento sur mont).

Mi ne tute akordiĝas kun la konstato bertila, ke oni prononcas (prononcu) duoblajn konsonantojn duoble, ĉar praktike oni uzas glotigitan konsonanton kiel en la itala kaj la japana, sed restas, eĉ en rapida parolo, rekoneble, ke temas pri duobla konsonanto (aŭ almenaŭ ĝi diferencas de la unuopa). Cetere, temas pli pri vortuzo ol pri baza afero. Sed mi aplaŭdas la konsilon, ke oni uzu duoblajn konsonantojn nur en kunmetitaj vortoj kaj en propraj nomoj (se necese). Mi aldonus ankaŭ la mencion, ke ofte oni povas eviti ilin pere de transira vokalo.

Karakteriza en la traktado, kaj laŭdinda, estas la Zamenhofeca toleremo kaj malemo al trudado de nepre obeendaj reguloj. Tia toleremo kaj preteco akcepti diversajn eblecojn estas tre nekutima en gramatikaj libroj sed esenca, laŭ mi, en Esperanto. Eble ĝi estas unu el la plej gravaj bazoj de nia fundamento kaj nepre kondiĉo por lingva sukceso. Kutime en gramatikoj regas la venĝema, regulema, punema, ordonema dio de la malnova testamento, ĉe ni regas la komprenema, bona, bonvola dio de la nova.

Ĉu ne jam Zamenhof diris en *Proverbaro*, ke *al ĉiu lingvoteritorio sia dio*? Se ne ... li hazarde forgesis.

Konklude: Tre kompleta traktado, tolerema kun amikeca atentigo pri atingebla korekteco.

Valento de verboj

Gramatiklibroj ĝenerale uzas multe da paĝoj por klarigi transitivecon kaj netransitivecon... aŭ, laŭ la pli klara terminologio bertila *objektajn* kaj *senobjektajn* verbojn, sed plej ofte ili forgesas mencii, ke ekzistas ankaŭ nulvalentaj verboj, *sensubjektaj* verboj. Antaŭ iom da tempo estis interesaj diskutoj pri tio en la reto. Grava estas

tiu fakto, ĉar ĝi klarigas, ke **frostinta/frostita lago* ne eblas, ĉar *frosti* estas (normale) sensubjekta, do *lago* ne povas esti subjekto (aŭ objekto) de *frosti*.

Pomego traktas la temon, sed la listo de verboj povus esti pli vasta (mankas la indiko, ke normale ĉiuj verboj pri vetersituacioj estas sensubjektaj) kaj mankas la rimarko pri la adjektiva aktiva participo. Ĝi povus ankaŭ pli klare atentigi, ke ĉe adjektiva aktiva participo la koncerna substantivo estas subjekto de la verbo, dum ĉe pasiva ĝi estas ĝia objekto.

Sed ĉu Zamenhof ne jam diris en *Proverbaro* ke *ankaŭ verbo nulvalenta povas esti talenta*? Se ne... li hazarde forgesis.

Konklude: Kompletigoj estas eblaj, sed granda helpo en tio sendube estos la elektronika versio. Gramatiko, kiu enhavas ĝuste ĉiujn esprimojn kaj frazojn kiujn oni volas uzi... neniam ekzistos, kvankam iuj ĝuste tion deziras.

Ĉu anarĥiismo regas?

Oni povus esti tentata al la konkludo, ke *Pomego* estas anarĥisma, ĉar ĝi lasas tro da libero. Tiu ideo, tamen, estus falsa. Bertilo deklaras sin fundamentisto (en la dua senco de *PJV2005*) kaj klare klopodas redukti ĉiujn problemetojn al la fundamentaj reguloj. Tiam oni alvenas ĉe la toleremo de Zamenhof, kiu vidis la lingvon kiel universalan interkomprenilon. Se via kunparolanto komprenas vin, same bone kiel en sia propra nacia lingvo (kio do ne nepre estas perfekte!), tiam ĉio estas en ordo. *Superfluan n ne ĝenos kaj kompensas iu mankanta*. Kaj la kazoj, kie severa regulo obeenda necesas, estas tre klare indikitaj. Kun iom da troigo oni povus diri, ke la libro alportas nenion novan. Kie estas do la utilo? Nu, mi estas tre kontenta havi ĝin, ĉar mia logiko, la homa logiko, ofte devojiĝas, ofte sekvas strangajn vojojn. Iam mi bezonis kelkajn tagojn por solvi la simplan problemon de la **frosti(n)ta lago*, kaj mi ne hontas konfesi tion. Kiam mi trovis, per rezonado, la solvon, ĝi ja estis treege logika kaj klara. Sed neniu homo estas neerar-ema. Cetere, tiu fama lago estas kelk-



foje trovebla en la bertila datenaro (ne en *Pomego*!).

Ĉu jam Zamenhof diris en *Proverbaro*, ke *al pacienca serĉanto ĉiam venas trovitaĵo*? Se ne, li hazarde forgesis.

Konklude: Se daŭra streĉiga pensado ne estas via ŝatokupo, se vi deziras sekuran havenon por ankri vian ŝipon, vi trovos amikon en *Pomego*.

Elŝimigo de Fundamento

Esperanta gramatiko tuj montras sian sintenon al la Fundamento: aŭ ĝi tutsimple ignoras ĝin, aŭ ĝi montras ĝin kiel historian (hontindan?) ruinaĵon, aŭ ĝi serioze prezentas ĝin. *Pomego* serioze konsideras ĝin, daŭre en la teksto (multaj ekzemploj ankaŭ estas prenitaj el la Fundamento, kaj por ĉiu prunteprenita frazo la fonto estas klare indikita) kaj ankaŭ en la plena prezento de ĝi, en fina ĉapitro sed komplete (tio signifas kun listigo de ĉiuj gramatikaj elementoj/reguloj el la ekzercaro). Mi konstatis, ke multaj junaj esperantistoj estas tute ne informitaj pri la Fundamento kaj tute ne konas ĝin.

Kaj ĉu Zamenhof ne proverbis ke *nekonate, neamate*? Se ne, li hazarde forgesis.

Konklude: *Pomego* estas plene fundamentobea libro. La solaj lokoj, kie la aŭtoro deklaras iun formon erara, estas kiam iu formo vere estas ne-fundamenta, en plej strikta senco. ►

Moderna kurso

por modernaj homoj

per modernaj metodoj

Aperis ĉe FEL nova „Ampleksa baza Esperanto-kurso”, kompakta disko (kodoromo) por Windows 95/98/ME/2000/XP, kun Esperanto-kurso, vortaro kaj vorttrejnilo kaj kun ampleksaj informoj pri la Esperantomovado. Akompanas la lecionojn muzikaj fragmentoj, i.a. de Kajto, Jomo, Persone... ekzemploj el la Esperanto-literaturo, kompleta numero de MONATO, rabatkuponoj por Esperanto-renkontiĝoj, kaj multe pli.

La kurso ekzistas kun kovrilo kaj klarigoj en la lingvoj nederlanda, franca, germana, angla, hispana, itala, portugala, dana, norvega kaj sveda.

Prezo ĉe FEL: **14,96 EUR** + afranko.
Distribuantoj ricevas rabaton de 33 % aĉetante tri ekzemplerojn aŭ pli samtempe.

Mendu la kurson (ne forgesante indiki la lingvon) ĉe
Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio;
rete: butiko@fel.esperanto.be
www.retbutiko.net



► Bibliaj tekstoj

luj rimarkigos, ke mi uzis iom bibliecan stilon por priskribi laikecan verkon. Nu, vole-nevole la verko iĝos biblio por pluraj sekvontaj generacioj kaj sendube evoluos plie. Ĝi ne enombriĝos PAG, ĉar tiu restos verko por gramatikemuloj, kiuj precipe deziras esplori, kiel oni en Esperanto povas redoni la serpentumajojn kaj fajnaĵojn de multaj naciaj lingvoj. PAG estas antaŭ ĉio, almenaŭ laŭ mi, klopodo de universala gramatiko pli ol pure esperanta. La pomo, cetere, igas min pensi pri la ĝardeno de Edeno, kien Adamo kaj Evo estis forsenditaj pro simpla unusola mordo de pometo. Ni, kontraŭe, ricevas *Pomegon* kaj enirbileton de paradizo, paradizo, kie oni respondas plej grandan parton de niaj demandoj. Kaj, cetere, la Majstro diris en *Proverbaro*, ke *oni lasu al ĉiu sian maroton*, aŭ se ne ... li hazarde forgesis.

Kompleza ekonomika kvalito

Mi komence demandis min, ĉu eble mia banko estas sponsoro de *Pomego*, ĉar mia banko uzas pomon – tamen kun formordita kavaĵo – kiel rekonŝildon. La prezo de la libro estas pli malalta ol tio, kion vi elspezus per elprintado de la elektronika versio (krom se vi havas la eblecon ŝteli la printadon en via firmao). Do nepre rapide mendu ĝin, eĉ se vi absolute ĉion scias pri gramatiko. Neniu valida kialo por ne fari tion estas imagebla.

Ĉu ne jam Zamenhof diris en *Proverbaro*, ke *avarulo kaj porko estas bonaj nur post la morto*? Ne! Li **ne** diris tion! Li, amuze, misskribis kaj kalumniis malavarulon!

Nepre aĉetinda verko por absolute ĉiu, eĉ se gramatiko ne estas via maroto.

Petro DESMET'

Bertilo Wennergren: *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*. Eld. ELNA, El Cerrito, 2006. 696 paĝoj kudre binditaj. ISBN 0-939785-07-2.

Prezo ĉe www.retbutiko.net: 27,00 eŭroj + afranko.

Pomo utila ... sed kun vermeto

Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino eldonis novan libron, en sia kutima maniero kun du paralelaj tekstoj – esperante kaj germane. La temon eblas difini kiel „La lingvoproblemo en Eŭropo kaj ĝia solvo per Esperanto”. Esence ĝi daŭrigas la libron *La kostoj de la Eŭropa lingva (ne)komunikado*, iam eldonitan en kelkaj lingvoj, sed, ĉar tiu libro aperis antaŭ pluraj jaroj, eldono de nova libro pri la sama temo estas sendube dezirinda. El ĝi oni povas facile ĉerpi materialojn por „sciencece” propagandi ideon pri enkonduko de neŭtrala interlingvo, kio estas tre grava, ĉar ofte la samideanoj faras tion iom amatorece. Almenaŭ pro tio la libron eblas rekomendi al ĉiuj aktivaj Esperantomovadaj propagandistoj. Por germanlingvanoj la libro povas esti eĉ pli facile uzbla, ĉar por ili eblas ĉerpi citaĵojn por varboprelegoj sen tradukpenoj.

Du nomoj de la aŭtoroj sur la kovrilpaĝo ne tro misgvidu la legonton: al la Nobelpremiito profesoro Selten en la libro apartenas nur unu ne tre granda artikolo; ĉio cetera apartenas al profesoro Frank, kaj, krome, estas kolekto de

diversaj dokumentoj pri neceso de la internacia lingvo, sufiĉe granda kaj utila (tie troveblas ĉio ekde dokumentoj de kristanoj kaj budhanoj ĝis la *Praga Manifesto*). La verva artikolo de profesoro Selten aparte gravas, tamen, pro tio, ke ĝi permesas al ĉiuj propagan-

distoj de la verda lingvo rekte citi tiun grandan eminentulon – ja nuntempe ne tro multaj Nobelpremiitoj estas adeptoj de Esperanto! Da artikoloj de profesoro Frank estas tri; unu temas pri la lingvo-orientiga instruado, ankaŭ ĝi utilas kiel rekta citadfonto por propa-

afrikano kaj amerikano povas dubi, ke enkonduko de Esperanto en Eŭropa Unio (EU) estus la unua paŝo al la disvastiĝo de la internacia lingvo tra la tuta mondo, ĉar tie ĝia bezono, pro ĉiam pli evoluanta ekonomia kaj politika integriĝo de la ŝtatoj kaj popoloj,

estas plej evidenta. Kaj, akceptite en Eŭropo, Esperanto pli facile disvastiĝos en la ceteraj mondopartoj. Tial ĉiu esperantisto ekster EU nepre salutas penojn por ĝia oficiala enkonduko en Eŭropo. Sed por profesoro Frank la afero aspektas iom alimaniere. Li vidas enkondukon de Esperanto kiel lastan paŝon de la lingva unuiĝo de Eŭropo; kaj la unua paŝo, laŭ li, devas esti enkonduko de ... la germana kiel la dua lingvo por ĉiu eŭropano, ĉar la germanoj nun estas la plej grandnombra kaj ekonomie potenca nacio en EU.

Sed kiaj avantaĝoj do de Esperanto, laŭ la estimata profesoro, ekzistas? Krom la komune konataj al ni ĉiuj – facileco, logikeco, belsoneco ktp, ktp? Ankaŭ la „eŭropeco”? Jes, jes, por profesoro Frank Esperanto estas eŭropa lingvo, kiu kontribuos al kreo de eŭropa identeco kaj apartigo de Eŭropo

disde la cetera mondo, kiu al ĝi minacas! Do, fakte, lia koncepto estas, se ni ekspliku liajn pensojn malkaŝe, ke devas aperi la nova eŭropa nacio kun sia forta naciismo; kaj portanto, vehiklo de tiu eŭropa naciismo estu la lingvo Esperanto (eble, iom ŝanĝiĝonta) ... ►



gandistoj, kaj du temas pri argumentoj por la internacia lingvo, speciale por Eŭropo.

Tamen tiuj artikoloj de Frank, malgraŭ senduba utileco, entenas kelkajn dubindajn asertojn, kiuj povas iom senvalorigi la tuton. Neniu aziano,

► Ĉu tio similas al kutima esperantisma koncepto, pensu mem – precipe se vi ne estas eŭropuniano!

Per tio ne finiĝas la sensaciaj mal-kovroj, kiujn oni povas trovi en la ar-

tikoloj de profesoro Frank. Li atencis ne nur la esperantismon (nu, kiu, krom esperantistoj tion rimarkos?), sed ankaŭ la estimindan scienccon geografion. Vi opiniis, ke Eŭropo troviĝas in-

ter Atlantiko okcidente kaj Uralo oriente? Vane! Eŭropo oriente finiĝas ĉe la limo de Rusio – minimume, ĉar la rusa lingvo estas same fremda al la eŭropa pensmaniero, kiel la angla, kaj Rusio tial ne estas parto de Eŭropo, same kiel Usono. (Samtempe, laŭ profesoro Frank, la ukraina lingvo, proksima al la rusa, sufiĉe bone esprimas la eŭropajn valorojn, por ke Ukrainio estu parto de Eŭropo.) De la alia flanko, sud-oriente Eŭropo facile transsaltis Bosporon kaj okupis la tutan Turkion (pro proksimeco de Turkio al propre eŭropaj valoroj kaj pensmaniero). Do, ĝi estas EU en tiu konsisto, kiun volas vidi sinjoro profesoro, sed ne tiu Eŭropo, kiun vidas la malnoviĝintaj geografoj de la Konsilio de Eŭropo.

Mi ne kredas, ke profesoro Frank mem ĉion tion inventis koncerne la geografion. Li, verŝajne, laŭte esprimas tiujn opiniojn, kiuj ja cirkulas en la medio de eŭropuniaj politikemaj intelektuloj kaj influaj politikistoj, kaj kiuj riveliĝas en la reala agado – ekzemple, per emfaze severa viza politiko rilate al civitanoj de Rusio, certaj ekonomiaj agoj kaj multe da aliaj aferoj. Li simple sekvas tiun ne tre estimindan pensmanieron. Sed ĉu tiu pensmaniero vere helpas al enkonduko de Esperanto en tiu limigita Eŭropo? Ĉu ĉiujn eŭropuniajn esperantistojn ĝi kontentigos? Mi esperas, ke ne ...

Konklude kion mi diris komence: la libro estas tre utila, enhavas multajn valorajn aferojn (ankaŭ en la artikoloj de Frank!) kaj estas bona donaco por tiuj, kiuj diskonigas verajn sciojn pri nia lingvo kaj ĝia neceso. Sed oni singarde rilatu al iuj ideoj de la ĉefa aŭtoro, kiuj, kiel noca vermeto, enŝteliĝis en la belan kaj bongustan pomon.


Nikolao Gudskov

Reinhard Selten, Helmar G. Frank: *Por du-lingveco en Eŭropo. Argumentoj kaj dokumentoj*. Eld. IFB Verlag, Paderborn, 2005. 112 paĝoj broŝuritaj. ISBN 3-929853-16-7, 3-931263-54-1.

Prezo ĉe FEL: 14,50 eŭroj + afranko



Helmar G. Frank kaj Reinhard Selten



Anna Löwenstein ĉepinte

La enketo farita dum la pasintaj monatoj en www.rebutiko.net havis la jenajn rezultojn:

La plej ŝatataj Esperanto-libroj estas:

1. La ŝtona urbo – A. Löwenstein (20 poentoj)
2. Vojaĝo en Esperanto-lando – B. Kolker (13)
3. Plena Ilustrita Vortaro (10)
4. Sed nur fragmento – T. Steele (8) kaj Vojaĝo al Kazohinio – S. Sathmári (8)
6. La infana raso – W. Auld (7)
7. La sankta Biblio (6) kaj Kiel akvo de l' rivero – R. Schwartz (6)

La respondo al la konkursa demando (Kiu estas la valoro de ĉiuj varoj en stoko en la Retbutiko je la 9a de

februaro 2006, se de ĉiuj eroj nur unu ekzemplero estas kalkulita?) estis:

14797,60 eŭroj

Tiu, kiu plej bone divenis la valoron estas Jeremy Aldrich (li divenis 15 385 eŭrojn) kaj li ricevos do la libropremion de 100 eŭroj! La premion de 50 eŭroj ricevas Mónica Molnár (ŝi divenis 13 752,64 eŭrojn) kaj la trian premion de 25 eŭroj ricevas sinjoro aŭ sinjorino Anderson (kiu divenis 13 535 eŭrojn).

Flandra Esperanto-Ligo dankas ĉiujn partoprenintojn!

Valora „pripensindaĵaro”? Alia opinio

En MONATO 3/2006, p. 20-21, Donald Broadribb prenis libron kiel pretekston por filozofiumi pri la rilatoj inter kulturo kaj lingvo, pri fonologiaj problemoj kaj la diferencoj inter tradukado kaj interpretado. La redakcio donis foton pri libro-kovrilo kaj ĉe la fino de la teksto feliĉe eĉ la bibliografiajn informojn. Pri la enhavo de la libro oni eksciis nenion, nek la traktitajn temojn, nek la nomojn de la aŭtoroj.

Tio estas mistrakto de la organizantoj kaj kontribuintoj de tre altkvalita simpozio, kiu realiĝis en Gotenburgo. Ja estas konate, ke nur malmultaj esperantistoj interesiĝas pri fakaj temoj, kaj faklibroj pro tio tre malbone vendiĝas. Des pli la recenzoj estu altkvalitaj kaj informodonaj. Se oni sekvas la difinon de „recenzi” en NPIV, *recenz/o* ja devus enhavi „mallongan kritikan raporton pri iu verko”. Do, unue oni devas honeste informi pri la enhavo de la verko kaj nur poste kritiku, (mal)laŭdu, filozofiumu ktp. Ĉar la recenzinto ne plenumis sian taskon (mirige, ĉar pri lia kapablo mi ne dubas), mi mencias la ĉapitrojn de la (ne)recenzita volumo:

Christer Kiselman: Preface / Antaŭparolo

Sture Allén: In the spirit of cultural communication (Spirite de kultura komunikado)

Jouko Lindstedt: Interlingva komunikado sen interlingvo: la balkania modelo (Cross-language communication without a lingua franca: the Balkan model)

Renato Corsetti: La arbo daŭrigas verda sian verdecon: lingvaj kaj kulturaj aspektoj de la lernanto-lingvo ĉe lernantoj de esperanto (The tree still greens its greenness: linguistic and cultural aspects of the interlanguage of people learning Esperanto)

Lars-Gunnar Andersson: What makes a language hard? (Kio faras lingvon malfacila?)

Detlev Blanke: Tradukado kaj esperanto: traduksciencaj aspektoj (Translation and Esperanto: on some problems of translation theory)

Probal Dasgupta: Kulturaj limoj kaj la civila socio en multlingva socio: aliro substancisma (Cultural boundaries and civil society in a multilingual society: a substantivist approach)

Probal Dasgupta: La communauté ouverte, les langues en Inde et l'espéranto: une perspective substantiviste (La malfermita socio, la lingvoj en Barato kaj esperanto: perspektivo substancisma)

Ilona Koutny: Interkultura komunikado en Eŭropo: la angla kaj esperanto kiel alternativaj komunikiloj (Intercultural communication in Europe: English and Esperanto as alternative communication tools)

Humphrey Tonkin: Esperanto: La kultura dimensio (Esperanto: The cultural dimension)

Franz-Georg Rössler: La muziko – ĉu vere internacia lingvo? (Music – is it really an international language?)

Zlatko Tišljar: Ĉu interkulturaj diferencoj helpas aŭ malhelpas la inter-




kulturan dialogon? (Are intercultural differences helpful for the process of intercultural dialogue?)

Detlev BLANKE

Symposium on Communication Across Cultural Boundaries/Simpozio pri interkultura komunikado, 2003-08-02-03. Red. Christer Kiselman. Eld. Kava-Pech, Dobřichovice, 2005. 157 paĝoj gluitaj. ISBN 80-85853-82-5.

Prezo ĉe FEL: 14,30 eŭroj + afranko

La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL,



Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.
Tif. + 32 3 234 34 00;
tlk. + 32 3 233 54 33;
rete: retbutiko@retbutiko.net;
skajpe fel-monato
aŭ per www.retbutiko.net.

POLLANDO

Memore je la pereintoj

Iliaj spiritoj estingiĝas kiam ili restas en forgeso.

Ĉi-jare, la 27an de januaro, en la 61a datreveno de la liberigo de koncentrejo Auschwitz-Birkenau [aŭŝvic birkenaŭ] fare de la sovetia armeo, denove la mondo honoris la pereintojn de Holokaŭsto¹. La „Internacian tagon de memoro pri Holokaŭsto” proklamis la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj por honori la memoron de la viktimoj murditaj de la nazioj dum la dua mondmilito.

Dum la solenaj omaĝoj la ombroj de l' murditoj estis inter ni, en niaj koroj. La murditoj memorigis pri sia kruela sorto; subtreto de la baza homa rajto vivi ... En pluraj preĝejoj diversreligiaj ili estis memorigitaj per preĝoj, funebraj kantoj, lumigitaj kandeloj ...

La „Internacia tago de memoro pri Holokaŭsto” donas al la homaro, al ĉiu homo, moralan devon fari ĉion por ke neniam plu ... Por ke la mondo fariĝu hejmo por ĉiuj homoj.

En Pollando, kie la nazioj establis la plimulton de la koncentrejoj, en kiuj estis murditaj homoj el pluraj nacioj, sed precipe judoj, tiu tago pasis tre solene kaj inde. La solenaĵojn aranĝis *Societo Ŝalom'* (Paco) sub gvido de sia prezidantino, la aktorino kaj reĝisorino Gołda Tencer [goŭda], kunlabore kun ĉiuj judaj organizaĵoj en Pollando. Honora Patrono estis la ŝtatprezidanto de l' Pola Respubliko, Lech Kaczyński [kaĉénjski]. Partoprenis kelkaj ministroj, reprezentantoj de la diplomataro,

Kantoro Israel Rand el Israelo preĝas ĉe la monumento de la herooj de la varsovia geto en januaro.



G. PUISNEY - WIKIPEDIA

estroj de komunumaj instancoj kaj la loĝantaro de Varsovio, ankaŭ de aliaj lokoj de Pollando.

Profundan impreson elvokis la mondfama kantoro Israel Rand el Israelo. Li korŝire preĝis omaĝe al la pereintoj per tre konvenaj kantoj: *Kol Nidrej'* (Ĉiuj solenaj promesoj), kiun kutime oni kantas antaŭ Jom Kipur' (Tago de repaciĝo kaj pentoj), la plej grava tago en judismo, kaj *El Male Raĥamin'* (Dio plena je mizerikordo), preĝo por la spiritoj de la mortintoj. Origine oni recitis ĉi tiun preĝon por la viktimoj de krucmilitaj kampanjoj kaj por la viktimoj de pogromoj dum la ribelo de Bohdan Chmielnicki en 1648. Poste omaĝe al ĉiuj mortintoj, per siaj preĝoj la kantoro kortuŝis ĉiujn. Kompletigis la preĝojn la konata aktoro Krzysztof Gosztyła [kjeŝtof goŝteŭa] deklamante fragmentojn el la korskua poemaro „Kanto pri la neniigita juda popolo” de la eminenta verkisto Iczhak

ZOFIA BANEF-FORNALOWA



ZOFIA BANET-FORNALOWA

*La placo de la herooj
de la varsovia geto.
Projektis ĝin Natan Rappaport
(1911-1987).*

*Rozo kuŝas sur ŝtono en Auschwitz
memore al murditoj.*

Kacenelson, kies edzino kaj du filoj estis murditaj en Treblinka, kaj li mem kun la tria filo en Auschwitz-Birkenau.

Post la solenaĵo ĉe la Placo de Herooj de la Geto okazis en la juda ŝtata teatro renkontiĝo kun du israelaj aŭtoroj, Jehuda Koren kaj Eilat Negev, kiuj verkis libron pri juda familio de nаноj-artistoj, kiu travivis Holokaŭston nur pro tio, ke doktoro Mengele en la koncentrejo Auschwitz-Birkenau, kie ili troviĝis, realigis je ili siajn kruelajn pseŭdo-medicinajn eksperimentojn. La dolorigajn sentojn, kiujn ĉi tiu historio vekas, estas malfacile esprimeblaj.

La sekvan tagon grupo el la nemultaj, kiuj travivis Holokaŭston, forveturis al la koncentrejo Auschwitz-Birkenau, kiu nun servas kiel muzeo memore al la murditoj. Tiutage je la 16a horo, laŭ alvoko de la organizantoj de la solenaĵo, en pluraj fenestroj de Polando ekflamis kandeloj.

Dum Holokaŭsto, inter milionoj da judoj, ankaŭ estis neniigitaj pluraj miloj de niaj samideanoj, judaj adeptoj de Esperanto kaj de la homaranisma idearo de Zamenhof, preskaŭ ĉiuj polandaj. Malgraŭ tiu katastrofa perdo, la kelkaj kiuj transvivis, kiel Isaj Dratwer, Jakub Garbar kaj aliaj, kune kun aliaj antaŭmilitaj aktivuloj sur la ruinoj de la lando aktive partoprenis en ĝia rekonstruo, ankaŭ laŭeble en la preskaŭ tute neniigita Esperanto-movado. Ne estis facile, kaj malgraŭ grandaj penoj de malnovaj esperantistoj kaj de sufiĉe multnombraj novuloj, neniam ĝis nun la pola Esperanto-movado reakiris la antaŭan idealisman nivelon.

Mi sentas grandan moralan bezonon revenigi al nia memoro kaj tiamaniere honori la viktimojn de la nazia rasismo, por tiel esprimi al ili ankaŭ niajn dankosentojn por ĉio bona, bela, valora, kion ili faris por la afero. Temas ne nur pri la historio. Danke al

iliaj faroj, ilia idealisma agado entute, la movado daŭras malgraŭ ĉiuj persekutoj kaj laŭeble penas kontribui al pli bona mondo en kiu estos respektata estimo je alieco, rajto digne vivi.

Tiucele mi verkis plurajn biografiajn artikolojn, memorigis ankaŭ pri la pereintoj de la familio Zamenhof en monografia verko kaj en la libro *La Pereintoj in Memoriam* pri alia sesopo, tre meritaj aktivuloj-verkistoj. Per memorigo mi celas proksimigi ilin al niaj koroj. Omaĝo al ili estu simbola pri ĉiuj viktimoj de Holokaŭsto.

La zamenhofa esperantismo estas nepre bezonata al la unuiĝanta Eŭropo kaj al la mondo, daŭre plena je konfliktoj, kiuj bedaŭrinde fojfoje ankaŭ nian Esperanto-komunumon ne evitas.

Zofia BANET-FORNALOWA

1. Holokaŭsto: origine „brulofero”, nuntempe ofte uzata por la amasmurdado de la viktimoj de l' dua mondmilito.

Japanaj ŝercoj




8 0-jarulo, petite, rakontis pri mizeraj spertoj dum la dua mondmilito al infanoj. „Dum la milito ni estis malsataj, ĉar ni ne havis manĝaĵojn”, li diris. Demandis infano: „Kial vi ne iris al superbazaro por aĉeti?”

Edzino demandis al sia edzo, kiu insistas, ke edzo ne eniru la kuirejon: „Kion vi manĝos, kiam mi estos malsana?” „Ne gravas, mi manĝos ekstere”, li respondis. La edzino: „Ne, ne! Mi demandas, kiu donos manĝaĵon al mi?” La edzo: „Ne gravas. Malsanuloj ne havas apetiton.”

Gasto en restoracio plendas: „Ve, via dikfingro estas en la supo!” Replikas la kelnerino: „Ne gravas, la supo ne estas varmega.”

HORI Jasuo



ANONCETOJ

...**jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj personoj 25-55-jaraĝaj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provkzemplo. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fö u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Ĉu vi scias, kio estas Esperanto-sudoko? Esperanto-sudoko estas sudoko-enigmo, en kiu oni ne serĉu 9 ciferojn, sed 9 literojn, nome la literojn el la vorto „Esperanto"! „Sudokoj", enigma libreto kun 80 diversaj enigmoj, kun ciferoj je 4 niveloj, sed ankaŭ kun literoj kaj eĉ spegulbildaj, nun aperis okaze de la 10-jara ekzisto de la Retbutiko. Ĝi signifas por vi horojn da enigmo-plezuro! Prezo: 3 eŭroj + afranko ĉe ĉiuj bonaj libroservoj kaj ĉe www.retbutiko.net.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Facilaj donacoj por viaj korespond-amikoj: la donacokuponoj de FEL. Ekzistas librokuponoj en kiu ajn sumo, kiun oni povas interŝanĝi en la Retbutiko de FEL (www.retbutiko.net), kaj donacokuponoj por trimonata, sesmonata aŭ jara abono al Monato. Por mendoj aŭ informoj: FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio



Abonebla kontraŭ
27 EUR,
30 USD aŭ egalvaloro
ĉe UEA, FEL, ELNA,
UFE, EAB, SEF kaj
dudeko da aliaj landaj
perantoj.

- * Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- * Tra Esperantujo
- * Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikajoj
- * Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- * Historio kaj kulturo de Esperanto
- * Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- * Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- * Literatura suplemento jarfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista

1kk@free.fr

4 numeroj jare + La Krom

REGULAJ KUNLABORANTOJ:

Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Ĵak Le Puil.



Abono: 22 €

(EKDE 14 EN KELKAJ LANDOJ)

**Jacques Le Puil,
pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp**

Komencanto

komencanto@r66.ru

"Komencanto"

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj.
Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spiritaj humuraĵoj ...

Regule aperas ekde 1998 — Formato A4, 16 paĝoj

Abontarifo: **15 eŭroj**
Aerpoŝta aldoni + 2 eŭroj.


retpoŝto: komencanto@r66.ru
provizora retpaĝo: www.Komencanto.narod.ru

Abonu ĉe UEA
aŭ ĉe via landa peranto

Poŝta adreso: KOMENCANTO,
pk 132, Ekaterinburg, 620041 Rusio

www.retbutiko.net

Vagu laŭplaĉe inter la verkoj de la Retbutiko.



Kategorio
elektu la
specon kiun
vi deziras

Kvanto
skribu tie ĉi la
kvanton, se vi
deziras mendi

Bildo
kun fotoj de la plej
gravaj verkoj



Detaloj
pliaj detaloj
kiel eldonjaro,
paĝnombro,
priskribo, ktp.

Recenzo
legu recenzojn
pri la verko

www.retbutiko.net

1996-2006
La retbutiko
10 jara!